

La lingva sinteno de Hector Hodler

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1987 februaro 19 kaj 21

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo87-06/SRI-1987-06-B-3-19-21-feb-1987-Claude-kaj-Andree-GACOND-La-lingva-sinteno-de-Hector-Hodler.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Proksimume la kvarono de la artikoloj de Hector Hodler pritraktas temojn rekte ligitajn al la lingvo internacia. Malgraŭ tiu abundo da tekstoj, estas malfacile trovi dirojn de la fondinto de UEA, kiuj estas pure lingvaj. Por Hodler la koncepto Esperanto estas io pli socia, ol pure lingva. En liaj tekstoj la vorto Esperanto ofte anstataŭas la vortojn esperantistoj, esperantistaro, esperantismo, esperantujo, esperanto-movado aŭ eĉ UEA. Ekzemple, kiam en sia parolado ĉe la dua kongreso de UEA Hector Hodler diras:

A.- "De la ideala kampo Esperanto transiris al la realeco."

Cl.- li fakte diras: "De la ideala kampo la esperantistoj transiris al la realeco." (sept. 1911. La organizado de la esperantistaro kaj UEA)

A.- En la sama parolado, kiam Hodler diras:

Cl.- Ni tamen ne povas konsideri sen emocio la "heroan" epokon de Esperanto." (idem)

A.- li fakte diras: "Ni tamen ne povas konsideri sen emocio la "heroan" epokon de la esperantismo" aŭ "de la Esperanto-movado".

Cl.- Por analizi la pure lingvan sintenon de Hector Hodler, oni devas malkovri la rarajn tekstojn, kie li nur parolas pri la lingvo mem. Enkonduke al la citado de tiaj tekstoj, ni opinias grave mencii tiujn ĉi.

A.- "Oni respektu Esperanton same kiel ĉian ajn nacian lingvon." (Okt. 1912, Kiel skribi por gazeto?)

Cl.- "Esperanto ne plu estas problemo de lingvistiko, sed realaĵo vivanta." (julio 1911, Du danĝeroj)

A.- Por Hector Hodler Esperanto estas realaĵo vivanta kaj respektinda, kaj lia respekto iras tra tiu de la Fundamento. Ni citas:

Cl.- "La Fundamento... estas necesa al la unueco de nia lingvo, kaj ni nepre devas ĝin konservi, sed oni ne devas interpreti ĝin kun mallarĝa konservativega spirito, kiu povus kredigi, ke ĝi estas vera baro al la evoluo kaj pliriĉigo de nia lingvo, kiel asertas kontraŭuloj de Esperanto. La necesa respekto al la Fundamento ne devas malhelpi la plibonigon de nia lingvo konforme al la bezonoj de la praktiko, pri kiuj povas plej bone juĝi la personoj uzantaj la lingvon en siaj internaciaj rilatoj." (Okt. 1919, Pri la landnomoj)

A.- Tiu ĉi ĵus citita teksto estas tre grava. Ĝi diskonigas novan ideon, ke povas juĝi pri la bezonoj de la praktiko nur la uzantoj de la lingvo, kaj eĉ inter ili nur tiuj, kiuj havas

internaciajn rilatojn. For la teorioj lingvaj. Ekzistas nur la realaĵo de la praktiko. Sed Hector Hodler kredas je la riĉigo de la lingvo per la eksperimentado de novaj formoj, kaj tiurilate, al la novemo de la verkistoj kontraŭstaras la malnovemo de la publiko. El tiu dialektiko iom post iom riĉiĝas la lingvo. Jen tiurilate signifaj citaĵoj:

Cl.- "Nia lingva unueco, unue formita, estas la plej certe starigita. Ĝi jam kiel bazon havas tradicion, kiu ŝirmas ĝin kontraŭ individuaj kapricoj. Tiu tradicio, ellaborata el la materialo liverata de la Zamenhofa Fundamento, kaj ĉiutage riĉigata per la uzado, sufiĉas al ni. La uzado estas la granda konservanto de 1' unueco, sed ĝuste por ebligi kaj faciligi ĝin, necesa estas la organiza kaj ankaŭ la ideala unueco." (januaro 1911, Unueco)

A.- "En kelkaj gazetoj oni nun prove uzas mis- (anstataŭ malbon-) kaj -enda (anstataŭ -ota), kiu ricevas pli specialan sencon. Se la uzo de tiuj formoj disvastiĝas, tiam la Lingva Komitato ilin oficialigos sed kompreneble por ke eksperimentado estu ebla, oni ne devas tuj trakti ĉiun ajn novaĵon kiel atenton kontraŭ la Fundamento. D-ro Zamenhof ja klare diris, ke la ekzisto de la Fundamento ne malhelpas plibonigi kaj perfektigi la lingvon. Oni tion pruvu! Pri "-io", ni ripetas, ke ĝi ne anstataŭas -ujo, sed nur limigas ĝian sencon (kiel -enda rilate al -ota). (junio 1920, Pri neologismoj)

Cl.- "Tiu eksperimenta metodo estas liberala kaj natura. Oni eble asertos, ke ĝi prezentas danĝeron, ĉar ĉiu skribanto povas provi novaĵon, tiel ke fine rezultos ĥaoso. La ĝisnuna historio montras, ke tiu timo ne havas fundamenton. Al la novemo de la verkistoj nature kontraŭstaras la malnovemo de la publiko. Aŭtoro, kiu plenigus sian verkon per tro multaj neologismoj, rapide ne plu havus legantojn, krom plenmano da lingvemuloj. Tiu ne povos sukcesi, kiu ne havas ĝustan mezursenton." (Idem)

A.- "Ŝanĝi la lingvon estas facila, sed malutila laboro. Kompletigi ĝin en la detaloj estas malfacila, sed utila tasko." (Idem)

Cl.- "Estas abismo inter la agado de lingvorompantoj kaj la penado por laŭgrade kaj praktike plibonigi la ekzistantan lingvon." (Idem)

A.- "Granda danĝero estas la Idismo, kiu restas en Esperantismo. Ni ne aludas pri la tendencoj klasika kaj novama, kies ekzisto estas normala, sed pri la tromultaj Esperantistoj kiuj rezonas Idiste, tio estas, vidas ekskluzive la lingvan flankon de Esperanto kaj restas ankoraŭ je la sama kompreno de ĝi kiel antaŭ dek jaroj (Tio estus aludo al Beaufronta periodo en Francujo)." (januaro 1911, Unueco)

Cl.- Hector Hodler defendis Esperanton kontraŭ la Ido-skismo kaj kontraŭ aliaj lingvoprojektoj: Idiom-neutral, Bolak, ĉiam post tre atenta trastudo de la koncernaj projektoj. Artikoloj spegulas tiun ĉi interlingvistikan aktivecon. Li konsciis, ke lingva sistemo vere supera al Esperanto sin venke trudus, eĉ se Esperanto estus socie multe pli potenca. Lia esperantismo restis malfermita al aliaj solvoj kaj estis konscia pri la eblaj mankoj de Esperanto. Jen tiurilate kelkaj citaĵoj:

A.- "Estas nekontesteble, ke la venko ne povas dependi de kelkaj negravaj lingvaj punktoj, ĉar la problemo de lingvo internacia estas pli socia ol lingva, sed oni ne povas nei, ke sistemo okulvideble supera al Esperanto fine sukcesus trabori sian vojon, eĉ se momente estas pli granda forto ĉe nia flanko." (februaro 1919, Novaj perspektivoj)

Cl.- "Eble la registaroj ne opinios kiel ni, kaj preferos alian formon ol Esperanto. Al tio ni respondas, ke kiam internacia aŭtoritato, havanta la povon trudi siajn decidojn, akceptos alian lingvan formon, ni volonte aliĝos al ĝi, sed ke ĝis tiam estus tre malsaĝe ŝanĝi la fundamenton de lingvo, kiun la eksperimentado montris taŭga kaj dank' al kiu miloj da homoj jam povis facile kaj plezure interrilati." (Idem)

A.- "Kiam oni deziras traduki tekston iom subtilan aŭ kun teknika karaktero, oni konstatas, ke Esperanto estas iafoje ne sufiĉe preciza aŭ tro peza, ĉar ankoraŭ mankas al ĝi la bezonaj radikvortoj aŭ komune akceptitaj frazturnoj... Estas la devo de la Esperantistaro doni seriozan atenton al tiu problemo." (marto 1919, Novaj perspektivoj)

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Prelegis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond pri la lingva sinteno de Hector Hodler. Ĝis reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), decembro 2012*